

LINGVO INTERNACIA

MONATA GAZETO POR LA LINGVO ESPERANTO.

ELDONATA DE LA KLUBO ESPERANTISTA EN UPSALA.

Kosto de abono por jaro:

kronoj 3,00 = germ. markoj 3,30 =
frankoj 4,25 = rubloj 1,50.

Pago por anoncoj:

15 öre = 15 pfenigoj = 20 centimoj =
8 kopekoj — por duonpaĝa petitlinio.

Adreso de la redakcio: *Klubo Esperantista, Upsala, Sverige.* (Svedujo.)

Upsala.

Februaro 1896.

N:o 2.

La "biblioteko" revivigita!

Ni rapidas komuniki al niaj legantoj unu ĝojan sciigon, kiun ni ĵus ricevis de s-ro L. Zamenhof. Li raportas al ni, ke li komencas denove eldonadi la "Bibliotekon de la lingvo internacia Esperanto". En bona kaj feliĉa horo! La Biblioteko estas unu el la plej gravaj entreprenoj en nia afero, kaj ni varmege salutas ĝian reviviĝon post la neatendita interrompo, kiun malfeliĉaj cirkonstancoj kaŭzis en la pasinta jaro. La reviviĝo de la "Biblioteko" promesas al ni baldaŭnan potencan ekfloron de nia afero. La konstanta aperado de novaj verkoj ne sole disvolvas kaj fortigas nian lingvon, sed ĝi estas la sola rimedo por montri al la mondo tute nedubbele, ke *ni vivas kaj konstante progresas*. Dum la konstanta akirado de novaj esperantistoj ne ĉiam dependas de nia volo kaj kun la akiritaj ni ne estas certaj, ĉu ia subita vento ilin ne forblovos, kaj dum al paroloj, rakontoj, laŭdoj kaj eĉ statistikaj ciferoj la mondo en nia tempo tenas sin ordinare malvarme kaj senkonfide, — per la konstante aperantaj novaj verkoj ni povas ĉiumonate montri al la mondo reale, videble kaj palpeble, ke ni kun ĉiu nova monato faris unu paŝon antaŭen, paŝon videblan, neelstrekeblan kaj nereperdeblan, — kaj vole-ne-vole la mondo havos respekton por nia afero kaj aliĝos al ni; ĉar nenio elvokas respekton de la mondo tiom multe, kiom konstanta ŝoviĝado antaŭen, konstanta prezentado de novaj realaj fruktoj, konstanta kreskado. La mondo juĝas pri aferoj ne per *pensado* sed per *rigardado*.

Por ke la "Biblioteko" povu finance ekzistadi, s-ro Zamenhof estis devigita nun iom plialtigi ĝian prezon; la prezo nun estos (kune kun transendo) 2 1/2 centimoj (= 2 pfenigoj = 1 kopeko) por ĉiu presita paĝo. Ĉe tia prezo la plej malgranda nombro da abonantoj, kiu estas necesa, por ke la "Biblioteko" povu regule eliradi, estas ĉirkaŭ 300. Ni ne dubas, ke tiu ĉi nombro da abonantoj estos baldaŭ atingita; ni ne dubas, ke la esperantistoj ne lasos nun denove fali tiun ĉi gravan, *eksterordinare gravan* entreprenon kaj ke ĉiu subtenos ĝin laŭ siaj fortoj, abonante almenaŭ po unu (kaj la pli riĉaj amikoj — pli ol po unu) ekzemplero de la "Biblioteko". — La nomoj de ĉiuj subtenantoj (abonantoj) de la "Biblioteko" estos ĉiam presataj sur

la kovrilo de la kajeroj de la "Biblioteko" kaj ankaŭ en nia gazeto. Ĉar en jaro eliros ĉirkaŭ 500 paĝoj, tial ĉiu ekzemplero kostos en jaro ĉirkaŭ 12¹/₂ frankojn. — La abonantoj pagas por la "Biblioteko" post la ricevo de ĉiuj 100 paĝoj; ĉiu, kiu deziras aboni, ne bezonas sendi monon, sed li devas nur sciigi s-ron Zamenhof, ke li petas sendadi al li la elirantajn kajerojn de la "Biblioteko" (kiu deziras ricevadi pli ol po unu ekzemplero, tiu sciigu tion ĉi en sia letero). Niaj legantoj, ne forgesu aboni la "Bibliotekon", ĉar de Via subtenado aŭ indiferenteco dependas la ekzistado aŭ neekzistado de tiu ĉi tre grava entrepreno! Se la ekzistado de nia gazeto kaj de la "Biblioteko" estos certigita, tiam ni povos esti tute trankvilaj pri la sorto de nia afero: regule kaj nehaltigeble ĝi moviĝados antaŭen, sendepende de ĉiaj cirkonstancoj kaj ventoj.



El Francujo.

Antaŭ kelkaj tagoj ni skribis sufiĉe longan artikolon pri nia lingvo por *l' Union Vélocipedique de France*, la plej malnova societo de ciklistoj en Francujo. Tiu artikolo, kiun ni titolis "Le cyclisme et l'Esperanto" estis tre bone akceptita dank' al nia amiko *Pierre Deullin*. Ĝi estos presita en la tuj venonta ĵurnalo de la societo, kiu kalkulas pli ol 20,000 da legantoj. Tiel ĝi povos fari grandan propagandon por nia lingvo, tiom pli, ke ni prezentis la demandon per la flanko praktika, rilate la ciklistojn kaj turistojn. En la fino de la artikolo ni aludis pri ekstera signo speciala por Esperantistoj, almenaŭ la turistoj. Tial ni denove turnas la atenton de la amikoj al tiu signo, pri kiu ni jam parolis en nia unua gazeto. Ni pensas, ke por la rolo, kiun ĝi devas ludi, la plej bona kaj oportuna objekto estas ia speco de butono, analogia al tiu de multaj ciklistaj aŭ turistaj societoj. Tiel oni povos enmeti ĝin facile en la butonumon de sia vesto kaj ankaŭ demeti ĝin senpene. Jen estas la priskribo de tiu signo: Sur blanka emajla butono de ĉirkaŭ du centimetroj da diametro oni vidas, en la centro, verdan steleton kun oraj radioj. Super la stelo oni legas la vorton "Esperanto" skribitan en malgrandetaj oraj literoj. Sub la stelo sin trovas du oraj branĉetoj de olivo, kruciĝantaj per la finoj de iliaj trunketoj, kaj la butono estas rande ĉirkaŭita per ora streketo. Tiel farita, la signo sin prezentas belvida kaj la steleton oni distingas tre bone, kia ajn estas la nuanco de l' vesto. Cetere la oro dolĉigas la krudecon de l' kontrasto, kiu ekzistus sen ĝi, inter la blanka kaj verda koloro. La olivaj branĉetoj, simbolo de paco, sin kunigas feliĉe kun la signifo de l' steleto, simbolo de espero, por fari pli simpatian al multaj homoj la signon, kiun ni proponas al la akcepto de niaj amikoj. La objekto ne kostus pli kare ol unu franko, laŭ fabrikaj informoj al ni donitaj en Parizo. Sed por tio estus necese, ke la mendo atingu la nombron de unu milo da ekzempleroj almenaŭ. Oferante por Esperanto eĉ pli ol ni devus laŭ ordinara prudento, ni solaj ne povas entrepreni la efektivigon de tiu intencata signo. Sed se la amikoj ĝin aprobas, ili havu la bonecon skribi al ni kiom da ekzempleroj ili konsentas aĉeti. Tiam ni vidos ĉu tiu projekto povas tuj ricevi plenumon aŭ devas ankoraŭ esti prokrastata.

L' Union Vélocipedique de France presos en sia ĵurnalo la diversajn vortojn proprajn al la ciklismo, tradukitajn en Esperanton, por montri bone, ke nia lingvo estas vere taŭga por tiu ĉi "sporto."


En *Montpellier* nia lingvo akiris varmajn amikojn ĉe akademio de kleraj junuloj. Ili estis altiritaj al Esperanto per unu membro de ilia societo, sinjoro *P. Pelissier*, kiu elokvente kaj konvinke prezentis al ili nian lingvon. La prezidanto de tiu akademio, s-ro *J. Lubac*, skribis al mi, ke li kun kelkaj amikoj fervore propagandos Esperanton en *Montpellier* kaj aliloke. Li jam komencis, parolante denove pri nia lingvo en unu kunsido de sia societo. La fondiĝo de Esperantista rondo en *Montpellier* estas tiom pli ĝojinda, ĉar la urbo posedas diversajn fakultatojn, por kies kursoj loĝadas en ĝi multe da studentoj francaj aŭ fremdaj. Sinjoroj *Lubac*, *Pelissier* kaj aliaj membroj de la supredirita akademio entuziasme aliĝis al nia lingvo.

Tre baldaŭ Esperanto kalkulos bonan amikon en la granda insulo *Madagaskar*. Tien efektive alvenos, post kelke da tagoj, en *Tananarivon*, sinjoro *P. Bourdier*, kiu aliĝis tre varme al la lingvo, dum li ankoraŭ loĝis en *Tébourba*, *Tunisujo*.

De *Alĝerio* kaj de *Kanada* ni ricevis leterojn petantajn informon pri nia lingvo. Ĉio igas nin esperi, ke la skribintoj donos sian aliĝon.

Ni presigis folion por montri la manieron ellerni metode kaj orde nian lingvon al francoj aŭ al kiu komprenas la lingvon francan. Estus bone, se ĉiuj niaj lernolibroj donu ion analogian al la novaj varbitoj, ĉar la sperto konvinkis nin, ke malgraŭ ĝia granda facileco, aŭ precize pro tiu facileco, multaj ellernas Esperanton tre mallerte.

L. de Beaufront (*Epernay*).



Esperanto en la vojo.

(Impresoj post la ricevo de l' prova numero.)

“Ankoraŭ unu jaro enfalis en la *Maron de Forgeseco*!... tiel plendas la poetoj, adoristoj kaj kantistoj de pasinteco. Sed alie juĝas la pensistoj, tiuj ĉi pioneroj de l' estonteco. Ili diras: “ankoraŭ unu jaro estas akirita por la regno de sinjorino *Klio*, por kiu nenio estas forgesata, nenio restas perdita. Eĉ kiam nia konscienco forgesis ion, ĝi restas tamen enskribita en la analoj de la historio, ĝi ne ĉesas tamen alportadi siajn fruktojn, bonajn aŭ malbonajn, — laŭ niaj meritoj.

Tiel, ankoraŭ unu jaro estas enskribita en la analoj de nia juna lingvo internacia, lingvo de l' estonteco. Kiel ni devas forkonduki la jaron travivitan? Ĉu ni devas ĝin bedaŭri aŭ salutadi? Mi ne scias, kion faros alioj, sed mi, por mia persono, mi el la tuta koro salutas la pasintan jaron. Tiu ĉi jaro estas laŭ mia opinio la jaro epokofarinta en nia afero, jaro en kiu nia afero akiris sian “ateston de matureco” kaj transiris en la staton de aŭtonomeco. Ĝis la jaro pasinta nia afero ne eliris ankoraŭ tute el la zorgemaj manoj de lia nobla aŭtoro. Nun, en la fino de l' jaro pasinta, la infano diris al sia patro: “Adiaŭ, patreto! Mi fariĝis jam plenaĝa kaj sentas nun bezonon de vivo pli sendependanta, ol mia vivo ĝisnuna. Mil dankojn, patro, por ĉiuj viaj ĝisnunaj zorgoj pri mi. Nun benu min kaj forlasu en la liberan mondon, kien mi iras serĉi la benitan landon de l' Espero!... Ne ĉagrenu, kara patro, ne timu pri mi! Kvankam mi estas ankoraŭ tre juna, en la aĝo de ne pli ol ok jaroj, mi min sentas tute plena da forto, plena da prudento, por ke mi ne perdu la vojon, kien mi ekiras. Mi estas jam plenaĝa — patro, benu min!”

Kaj la patro ĉirkaŭprenis sian ĉarmantan infanon, kisis ĝian dolĉesonantan buŝon kaj diris per voĉo tuŝita:


“Trankviliĝu, mia kara! Mi ne timas pro vi, mia saĝulo! Mi vin konas, mi vin

kredas, kaj mi scias, ke vi estas jam plenaĝa. Estu do benita de hodiaŭ ĝis eterne! Iru feliĉe en la vojon, kiun vi elektis. Ĉirkaŭiru la tutan teran globon, kaj serĉu la benitan landon de l' Espero! Kaj memoru ankoraŭ mian sekvantan konsilon: nenie forgesu kaj neniam ŝanĝu vian karan *nomon*! Ĉie, kie vi vin trovos, diru al ĉiu, ke via nomo estas Esperanto kaj ke vi serĉas en la tuta mondo vian karan patrujon, la belan landon de l' Espero. Tiam ĉiu, ekaŭdinte vian nomon, montros al vi la vojon, kondukantan al via dezirata lando, al la bela lando de l' Espero.“

Pasis nur kelkaj monatoj, kaj por la nova jaro 1896 la infano Esperanto alsendis al mi sian unuan leteron... Ĝi estas jam en Svedujo, kie ĝi fondis gazeton, tute nedependantan de ĝia patro...

“Bonan vojon, plenan sukceson!” — ni salutas la infanon kaj kune ankaŭ ĝian patron.

Ben-David.




Defalinta folio*)

De trunketo disigita,
Vi malgaja, sekigita
Kien iras, folieto?
“Vento kverkon ruinadis,
Kiu min sur si tenadis;
Tiam, tute fordonanta
Min al vento forfluganta

Mi trakuras en momento
Valon, monton, kun la vento;
Kaj en tiu ĉi movado
Mi vojaĝos sen timado
Kun folio de la rozo,
Kaj folio de la laŭro
En la tuta vivodaŭro!“

Trad. Costa e Almeida.




Granda spaco.

(El W. Wackernagel.)

Spacon havas mi sen limo
Por konstruoj en aer',
Por amego en animo
Kaj por tombo en la ter'.

A. Kofman.



Novaĵoj.

Ĉar, pro kaŭzoj konataj al niaj legantoj, la konkurso, proponita en *N.* 62 de la gazeto “Esperantisto“, ne povis efektiviĝi, tial s-ro Zamenhof proponis per cirkulero al ĉiuj membroj de la konkursa komitato, ke oni permesu al li uzi la konkursan monon por eldono de unu tre grava *propaganda broŝureto* en kelkaj plej gravaj lingvoj. La membroj de la komitato donis la sekvantajn voĉojn: s-roj Almeida, de Beaufront, Borovko, Geoghegan, Gernet,

*) Tiu ĉi versaĵo estis originale verkita de la franca poeto *Arnault* kaj portas la titolon “La feuille“. En lingvon portugalan ĝi estis tradukita sub la titolo “Folha cabida“ de la glora portugala lirika poeto *Joao de Deus*, kiu mortis antaŭ unu monato kaj kiu en la pasinta jaro, en la tago de sia jarfesto, ricevis multajn salutojn el ĉiuj klasoj de la popolo portugala.

Tradukinto.

de Kanaloŝi, Langlet, Marignoni kaj Schmidt akceptis la proponon (s-ro Almeida antaŭe proponis ion alian, sed post la ricevo de la cirkulero reprenis sian proponon; s-roj Borovko kaj Marignoni antaŭ la ricevo de la cirkulero voĉis por la propono de s-ro Almeida, sed kiam tiu ĉi lasta reprenis sian proponon, ili akceptis kune kun li la proponon de s-ro Zamenhof); s-ro Trompeter proponis, ke la mono estu fordonita al s-ro Zamenhof, por parte rekompenci liajn perdojn; s-ro Grabowski proponis uzi la monon por la gazeto, sed esprimis, ke li donas sian konsenton ankaŭ al la propono de s-ro Zamenhof; s-ro Ostrovski proponis uzi la monon por la gazeto (kiu tiam ne estis ankoraŭ fondita). En tia maniero la konkursa komitato per plimulto da voĉoj akceptis la proponon de s-ro Zamenhof, kaj tiu ĉi lasta komencis jam la presadon de la dirita broŝuro. La broŝuro eliris jam en lingvoj rusa kaj franca kaj baldaŭ eliros ankaŭ en aliaj lingvoj. La broŝuro rusa portas la numeron 85, la franca portas la numeron 86. Unu ekzemplero de la broŝuro kostas 5 centimojn.

La libreto enhavas mallongajn sciigojn pri la lingvo Esperanto, la leterojn de grafo Tolstoj, de Max Müller, de Henry Phillips kaj ankaŭ la ateston de s-roj Langlet kaj Etsel, ke ili dank' al helpo de la lingvo Esperanto facile kaj oportune traveturis la tutan Rusujon. Krom tio en la libreto sin trovas ankaŭ propono partopreni en la tutmonda korespondado: ĉiu, kiu deziras partopreni, devas nur alsendi al doktoro Zamenhof sian adreson kun traduko de la malgrandaj pecetoj, presitaj en la broŝuro, kaj 40 centimojn en poŝt-signo, anstataŭ kiuj li ricevos la adresaron, necesan por la korespondado. Li bezonas nenion lernadi antaŭe, sed nur per alsendo de sia adreso doni la permeson, ke oni adresadu al li leterojn en Esperanto. Ni ne dubas, ke tiu ĉi malgranda, sed tre bone verkita broŝureto fariĝos tre utila propagandilo en la manoj de niaj amikoj kaj altiros al nia lingvo pli multajn personojn, ol la antaŭaj propagandaj folietoj, kiujn eldonadis d-ro Ostrovski, s-ro de Beaufront, la odesaj esperantistoj kaj aliaj. Ĉar la libreto kostas tre malmulte, ĉiu povas aĉetadi ĝin kaj dissendadi al siaj konatoj en granda nombro da ekzempleroj. Tial ni varmege rekomendas la novan batalilon al la amikoj de nia lingvo.

* * *

Eliris el la presejo "*Novaj Esperantistoj, serio XVI*". Tiu ĉi verko, eldonita de L. Zamenhof, estas enprenita en la Nomaron de verkoj sub N:o 83 kaj kostas 50 centimojn. Ĝi estas aranĝita laŭ tute nova maniero, konforme al la postuloj de la nova propaganda broŝuro. Krom la adresoj de novaj esperantistoj, orditaj laŭ landoj kaj urboj, ĝi enhavas la publikigon de ĉiuj tiaj adresoj, kiuj estis ŝanĝitaj en la lasta tempo. Krom tio ĝi enhavas unu novan tre gravan rubrikon statistikan, kiu de nun fariĝos rubriko konstanta, nome: nomaron de ĉiuj esperantistoj varbantoj, kun la nombro kaj numeroj de la personoj, kiujn ĉiu altiris a) en la lasta periodo da tempo, kaj b) en la tuta tempo de la komenco ĝis nun.

* * *

En la cirkulero de la "*Kadem Bevūnetik Volapūka* de 20/XII 95 estas dirita, ke s-ro Chr. Schmidt el Nurnbergo aprobis la laborojn de la "*Kadem*" kaj eniras en tiun ĉi "*Akademion*". El Nurnbergo ni ricevis ankoraŭ nenan sciigon pri tio ĉi, kaj ni pensas, ke estas simpla malkompreniĝo. Ke tia malkompreniĝo estas tre supozebla, ni konkludas interalie el la fakto, ke la

cirkulero diras pri s-ro Schmidt, ke li "distingiĝis inter la esperantistoj per kritikado de la eraroj de la lingvo Esperanto kaj per fervoraj laboroj por enkonduko de plibonigoj en tiun ĉi lingvon", — dum en efektiveco tio ĉi estas *absoluta fantazio*, ĉar s-ro Schmidt neniam diris *eĉ unu* vorton da kritiko kaj neniam faris *eĉ unu* paŝon por plibonigado de Esperanto.

* * *

S-ro *Fedorovski* en *Moskvo*, kies anonco pri la depot' da semoj estas presata en nia gazeto, petas nin sciigi la legantojn, ke lia katalogo da semoj en estonta jaro *estos presita ankaŭ en Esperanto*, se la esperantistoj mendas ĉe li semojn. Se do neniu el la esperantistoj alsendos al li mendojn, tiam, kompreneble, la katalogo ne povas esti presita en Esperanto. Por ke s-ro *Fedorovski* sciu, ke la mendoj venas efektive de la esperantistoj, li petas notadi sur la leteroj, adresataj al li: "*de esperantisto*". La nombron da esperantistaj mendoj li bezonas ankaŭ scii, por presi poste la katalogon en konvena nombro da ekzempleroj.

* * *

Smithsonian Institution, Washington, U. S. A., sendis per sia bibliotekisto, s-ro *Cyrus Adler* al la *Klubo Esperantista* en *Upsala* leteron, en kiu oni petas ricevi nian gazeton "*Lingvo Internacia*" kaj promesas anstataŭ sendi al la klubo la "*Annual Reports*" (Jarlibro) de la Instituto. *Smithsonian Institution* estas, kiel niaj legantoj sendube scias, la plej granda kaj glora scienca instituto en Ameriko kaj havas lokon en la unua vico de tiaj en la tuta mondo. Kiel ĝia prezidanto kaj estro oficas la prezidanto de l' granda Unio. — Kompreneble la klubo en *Upsala* kun ĝojo plenumas la peton.

* * *

Ni aŭdis, ke la Societo de Svedaj Turistoj (*Svenska Turistföreningen*) intencas enkonduki lingvon internacian por praktika uzado inter siaj membroj kaj zorgi, ke la provincaj institutoj de la Societo havu almenaŭ po unu membro, scianta nian lingvon. Se tio ĉi estas vera, ni ne dubas, ke ĝi multe helpos al vekigo de emeco por vojaĝoj kaj elvokos pli grandan movadon inter la eksterversvedaj turistoj, pli faciligante la vizitadon de atentindaj lokoj en tiu ĉi belega lando. Se ni ricevos pli detalajn sciigojn pri tio ĉi, ni komunikos ilin al niaj legantoj.

* * *

Sinjoro *E. Arduin*, posedanta la vinberejojn en *Caudéran* (*Gironde*), petas nin presi la sekvantan lian cirkuleron:

Bordeaux, 7-a de januaro, 1896.

Sinjoro,

La lingvo internacia "*Esperanto*", ebligante facilan korespondadon inter ĉiuj popoloj, kaŭzos aliformiĝon grandegan en la komercaj rilatoj. Fariĝinte pli oftaj, la internaciaj rilatoj simpliĝos kaj celos pli kaj pli atingi la idealon, t. e. ebligi, ke la konsumanto sin turnu rekte al la fontoj de l' produktoj, ke li komparu unu kun la alia, ke li esploru iliajn elementojn kaj fine decidu kun sciado de la afero. Tio ĉi estas nun al ni neebla pro la multaj kaŭzoj de eraro, trovataj en la makleristoj, kiuj prilaboras, aliformigas, eĉ elnaturigas la produktojn de l' tero tiamaniere, ke tiuj ĉi alvenas al la adresato nur

malprecize similaj je ilia tipo natura. La forĵeto de la makleristoj estos garantiaĵo de aŭtentikeco de la produktoj kaj ankaŭ fonto de l' profito, ĉar la forto de konsumado grandiĝos per ĉio, kio perdas sin tra la multaj etapoj de la ŝtofo. En tiu duobla ideo, kiel produktanto-komercisto, mi turnas min al vi, petante ke vi sciigu min, ĉu inter viaj konatoj sin trovus iu, disponita okupadi sin, je mia kalkulo, per la maklera vendado de miaj vinoj kaj brandoj.

E. Arduin.

11 rue Turenne, Bordeaux.

Ni turnas la atenton de niaj legantoj al tiu ĉi cirkulero. Nia lingvo havas grandegan signifon en la regionoj komercaj kaj estus tre utile eĉ por la lingvo mem, se iu el niaj amikoj akceptus la proponon de s-ro Arduin.


* * *

Pri la lingvo Esperanto parolis en la lasta tempo la sekvantaj gazetoj kaj ĵurnaloj: en la n:o 27 de ĉiusemajna odesa gazeto "Po morju i suŝe" estas presita artikolo de V. G. pri la vojaĝo de s-roj Langlet kaj Etzel tra Rusujo; pri la sama vojaĝo sin trovas tre bela artikolo de A. Ĉ. en la granda peterburga ĉiusemajna gazeto "Nedjela"; tiu ĉi artikolo estis represita en la N:o 8368 de la ĉiutaga odesa gazeto "Odesskija Novosti" kaj en la N:o 201 de la ĉiutaga odesa gazeto "Odesski Listok"; en la N:o 8369 de la "Odesskija Novosti" en la ĉiutaga folietono de s-ro Slovo-Glagol sin trovas kelkaj mokoĵoj pri la sama vojaĝo. La artikolo de V. G. el N:o 27 de la "Po morju i suŝe" estas presita en sveda traduko en la N:o 293 de la granda ĉiutaga sveda gazeto "Stockholms Dagblad". La korespondadoj de s-ro Langlet pri lia vojaĝo estas presitaj en 11 n:oj de l' granda ĉiutaga svedo gazeto "Nya Dagligt Allehanda". Tre multaj svedaj, francaj kaj rusaj gazetoj parolis pri tiu ĉi vojaĝo. Pri "L'Etranger", "L'Eclair" kaj aliaj francaj gazetoj ni jam diris en la antaŭa numero.

La portugala gazeto *Aurora do Cavado* (N:o 1:458, 1 jan. 1896) enhavas sufiĉe longan artikolon pri nia gazeto sub la titolo: Lingvo Internacia, monata gazeto por la lingvo Esperanto. — Ne sciante la lingvon portugalan ni ne povas traduki la artikolon: tamen estas videble ke ĝi estas favora al nia lingvo.

En *Svedujo* ne malmultaj gazetoj parolis pri nia gazeto. Ni nomas kelkajn, kiujn oni alsendis al ni: Östergötlands Dagblad N:o 296, Kristianstadsbladet N:o 294 (1895) kaj Fyris, Upsala Nya Tidning, Östgöten k. c.

En la N:o 231 de la tre disvastigita en Rusujo ĉiutaga gazeto "Russkija Vedomosti" estis lokita la sciigo ke oni intencas aranĝi en Odeso tutmondan esperantan kongreson; la sciigo estis tuj represita de preskaŭ ĉiuj rusaj gazetoj, interalie de "Novorossijski Telegraf" (N:o 6548), "Odesski Listok", "Odesskija Novosti", "Novosti" kaj aliaj. En "Novosti" estis presita moka artikolo de *Bukva* pri la kongreso; tiun ĉi artikolon reprenis la "Odesskija Novosti" en la N:o 3395, la N:o 238 de la "Odesski Listok" ankaŭ enhavas kelkajn mokoĵojn pri nia lingvo. La mokaj artikoloj de la odesaj gazetoj ne restis sen rezultato. Unu instruisto en Odeso, s-ro L. D., traleginte ilin, venis al la konkludo, ke la afero de lingvo internacia sendube estas afero bona kaj meritas atenton, se la ĵurnalistoj, mokante ĝin, diras nur malsaĝaĵojn kaj trovas nenian seriozan kontraŭdiron. Li ellernis la lingvon, konatiĝis kun la odesaj esperantistoj kaj fariĝis varmega amiko de nia lingvo.



Folietono.

Se la afero de l' lingvo internacia ne havus kapon, sed sole piedojn, ĝi malgraŭ tio ne povus iri antaŭen, ĉar ĝi ne estas velocipedisto. Ŝajne nia afero estas iom pli grava, se eĉ tiuj ĉi sportsmenoj povas sen internacia lingvo vojaĝi kune, sed ne komprenante unu la alian...

Tiel almenaŭ certigas nin en la 152-a numero de la ĵurnalo "Velociped" unu sinjoro... Mi ĉiam havis simpatian por velocipedo, kiel por rimedo de pli rapida proksimiĝo de homoj, sed nun mi vidas, ke la velocipeda afero sen

la lingvo internacia estas nur afero de piedoj, dum la homoj penas ĉiam pli kaj pli por havi ankaŭ la kapojn. Ne estas granda arto veturi, sed estas arto *alveturi*, kaj estas ja sciante al ĉiuj, ke alvenas al la celo sole tiu homo, kiu krom la piedoj havas ankaŭ la kapon.

Kiam nia afero havas nun ĉion, kio estas bezona por pleneco, ĝi veturos pli rapide antaŭen, des pli, ke bonaj spiritoj eklumigis la fokuson de niaj pensoj, kiuj de nun ne devas erari en malluma spaco, ĉiu aparte... Jes, ni havas nian gazeton, nian fokuson, nian kapon.

El la leteroj de miaj amikoj mi scias, ke nia afero sukcese progresas en ĉiuj landoj, precipe en Svedujo, Francujo kaj Portugalujo. Kial ĝi ne disvolviĝas en Grekujo aŭ Hispanujo — mi ne scias, ĉar post la morto de la sep saĝuloj la oka ankoraŭ ne naskiĝis, nek tie, nek en Hispanujo. Unu malpli konata filozofo konsilis al mi, ke la esperantistoj edziĝadu kaj enloĝiĝadu en tiuj ĉi landoj sole por multobligi la nombron da esperantistoj, — tamen mi ne konsilas tion ĉi fari, ĉar tio ĉi ne sole povas doni dubeblajn rezultatojn, sed forprenos de iu volanton eldonadi konformajn lernolibrojn kaj vortarojn de nia lingvo por tiuj ĉi popoloj. Mi supozas eĉ, ke estus pli bone komenci de la eldonado de vortaroj kaj poste jam korespondadi kun belaj aŭ almenaŭ riĉaj grekinoj kaj hispaninoj, ĉar en tiu ĉi okazo la interkompreniĝado per helpo de tradukanto estus tro riska... La klarigantoj de tiel delikataj aferoj ordinare estas bravaj, junaj kaj belaj, kaj tio ĉi ne estas sendanĝera por niaj apostoloj, kiuj per tiela maniero dezirus dislarĝigi sian efikecon...

La ĉefa profito el la lingvo internacia devas fluadi per nia gazeto, kiu, volante presi multe da interesantaj kaj freŝaj verkoj, devas havi korespondantojn en ĉiuj landoj. Per tiu ĉi maniero ni ĉiuj havos lumon el la fokuso de niaj pensoj, konservante ankaŭ la aldonitecon al niaj hejmaj aferoj.

Se ĉiu esperantisto volus priskribi nur sian — ne enamiĝon — sed jam edziĝofeston kaj ankaŭ la morojn de konataj vilaĝanoj, nia gazeto havus belan etnografian materialon, kiu estus en nenia ĵurnalo pli frue presita, sed poste estus presita en ĉiuj naciaj gazetoj. La homoj, kiuj ametas poezion, povus ne elserĉadi rimojn por siaj elĝemataj fabrikatoj, sed priskribadi morojn de superstiĉaj proksimuloj, kiuj en Kristnaskaj festoj, en nova jaro aŭ en Pasko aranĝas diversajn specialajn ceremoniojn, el kiuj ĉiam ventumas la poezio kaj el kiuj oni povas ellegi estontecon de virgulinoj, dezirantaj nepre edziniĝi kun junaj fraŭloj... Ekzistas homoj, kiuj tion ĉi bone jam scias, sed kiom ekzistas ankoraŭ da homoj, kiuj nenion scias pri tiuj ĉi superstiĉoj?... Ĉe poloj ekzemple en vespero de antaŭtago de S^uo Andreo (la 29-a de novembro) virinoj disfandas vakson aŭ plumbon kaj enverŝas ĝin en argilan profundan pladon, plenan da akvo, poste la rapide malvarmigita peco oni tenas inter kandelo kaj muro kaj kion oni ekvidos en ĝia ombro, tio servas kiel antaŭdiro. Ekzistas ankaŭ miloj da aliaj ceremonioj, kiujn mi penas iam priskribi por la esperantistoj, ĉar tiuj ĉi aferoj estas multe interesantaj ne sole por la etnografistoj, sed ankaŭ por ĉiu fraŭlino kaj juna vidvino, al kiuj tiu ĉi terura stato jam tedis.

Al alia amiko okazas tralegi ion interesantan en lia gazeto. Kial li ne povas traduki tiun ĉi verkon por nia gazeto, precipe se la verko estas produkto de glora verkisto... Ŝajnas al mi, ĉiu lando havas eminentajn homojn, kiuj laboras ne sole por sia nacio, sed ankaŭ por la tuta homaro kaj nur pro malfacileco de internacia komunikiĝo tiaj verkoj devas resti en interno de unu popolo.

“Oni devas sin lerni, pasis la ora centjaro“, diris la pola poeto, kaj ŝajnas, ke kiu ĝis nun ne sciis tion, nun ekmemoros ĝin kaj diros, ke la poeto havis rajton kvankam li estis forta nur per spirito. Sed forto sin trovas ne sole en nombro da bajonetoj!... Nikolas Kopernik sen paflegoj haltigis la sunon kaj movigis le teron, kial do nia lingvo ne povas haltigi la malpacon de nacioj kaj movigi la korojn en konsenta batigo de l' vera civilizacio?

Józ. Wasniewski.



Filino de Iftah.

Fajfegas ĵetiloj kaj sonas grand-glavoj
Kaj brilas kaj frapas ponardoj.
Sed vane laciĝas herooj la bravaj.
Pereas Jehovaj standardoj,
Kaj la Amonanoj la sangoavidaĵoj
Triumfe rapidas al l' Izraelidoj.

Ben-Jáir mortigas kun ŝtono en brusto,
Kaj Gilad droniĝas en sango,
La kapo de Máhir, nomita “la justa“,
Surstaras sur pinto de stango,
Kaj miloj da filoj de l' Supra Jehovo
Ekkuŝis sur kampo sen vivo, sen movo.

Ho ve, ho malĝojo! La ondoj Jordanaj
Elmetos ĝemegojn sovaĝajn,
Ploreĝos patrinoj pri siaj infanoj,
Disgratos al si la vizaĝojn,
Elŝiros la harojn, per cindro la griza
Eksutos la kapojn ĉe l' nigra avizo.

Kaj Iftah frenezas. Vidante la timon
De la elektita popolo,
Li vane penegas bravigi l' animon
De viroj per laŭta parolo,
Kaj jen li ekpreĝas kun malpacienca
Al Dio Jehovo, la Suprepotenca.

“Ekaŭdu, Jehovo, ekaŭdu la sklavon,
Preĝantan al Vi kun doloroj!
Mi hejme en Micpo posedas riĉhavon,
Aregon da grandaj trezoroj.
Mi havas amikojn, mi havas sklavaron
Kaj multon alian, al koro tre karan.

“Ho savu nin Vi, jam savinta la avojn
El la Egiptujo-fremdlando,
Se Vi liberigos nun ree la sklavojn
De l' nuna mizero multgranda,
Mi, Micpon venonte, al Vi, mia Dio,
L' unuavidoton oferos kun pio.

“Kaj kio ajn estos l' unuavidoto,
Objekto aŭ homo amata,
Ĝi estos al Dio brulig-oferota
Al Vi, ho Jehovo kompata!“
Kaj jen, elmetante kriegojn sovaĝajn,
Li ree ekscitas la virojn kuraĝajn.

Fajfegas ĵetiloj kaj frapas ponardoj,
Resonas ekĝemo kaj krio,
Kaj la Amonanoj kun timaj rigardoj
Forkuras de l' idoj de Dio,
Sed la forkurantajn postflugas rapide
La Izraelidoj kaj hakas avide.

Kaj de Aroero ĝis urbo Minito
Kaj poste ĝis Avel-Kerumo
Triumfas Izrael en sanga milito
Per glavo, per fajro kaj fumo,
Venkataj pereas sub domoruinoj,
Sklaviĝas bestaroj, infanoj, virinoj.

Kaj plene ŝarĝitaj per riĉaj akiroj
Reiras herooj kantantaj,
Al kantoj iliaj aliĝas sopiroj
De la ekkaptitoj plorantaj,
Kaj ĝemas virinoj lacintaj kaj palaj,
Kaj dume sonadas la gajaj cimbaloj.

Sed jen apudiĝas jam Micpo la kara,
kaj Iftah rigardas sen ĉeso:
Li devas ekvidi por dia altaro
Oferon laŭ sia promeso.
Kaj li rigardadas sen laco-enuo:
“Nu, kio do venos al mi la unua?“

Jen el malproksimo eksonas tintiloj,
Cimbaloj, fajfeloj kaj kordoj.
Junuloj, fraŭlinoj per paŝoj facilaj
Ĝojdancas en vicoj senordaj
Kaj ridas kaj kantas, sin gaje balancas,
Kaj al la venkintoj gracie aldancas.

De pleja proksimo al la triumfanoj
Sin movas fraŭlino junaĝa.
Ŝi batas tintilon per siaj blank-manuoj,
Kun flamo en bela vizaĝo;
La harojn serpentajn la vento disblovas,
Ŝin forto interna antaŭen almovas.

Si dancas, ŝi tintas, ŝi kantas kun ĝojo:
“Alvenas la gloraj venkintoj,
Ke estu facila por ili la vojo,
Sonegu la gloron per tintoj!”
Si dancas, movata de l' kora kontento,
Nenion anoncas al ŝi l' antaŭsento.

Kaj Iftah rigardas al sia ofero,
Al sia unuavidato....
Subite... ho, tio ĉi estas ne vero....
Si estas — *filino l' amata!*
La sola filino! Jehovo ĉiela!
Ho, kia malico de l' sorto kruela!

Kaj Iftah ĝemegas, disŝiras la veston
Kaj cindron sur kapon surŝutas,
Kaj inter la viroj, volantaj ĝojfeston,
Li vortojn terurajn balbutas...
Kaj ĉio mutiĝas. En kelke da horoj
La Izraelujon ekprenas doloroj.

“Ne ploru, ho patro, ĉesigu la ĝemon
Kaj estu do viro ĝis fino.
Vi faris promeson ne malsingardeman,
Ĉar kion signifas fraŭlino
Kompare je miloj da viroj, savitaj
Per la heroaĵoj, de Dio donitaj?”

“Vi faris promeson glorindan, ĉar savo
De miloj per unu ofero
Eterne estados farajo multbrava,
Belega, mirinda afero,
Kaj timos nacioj la Izraelanojn,
Ĉar ili ne ŝparas eĉ proprajn infanojn.

“Vi donu ekzemplon, plenumu la vorton,
Sciigu l' amatan popolon,
Ke ĝoje mi prenas nun tiun ĉi sorton,
Ke mi ne bezonas konsolon.
Multegaj fraŭlinoj ekzistas, mi scias,
Ĉe ni, kinj mian mortigon envias.

“Nur unu malĝojo min pikas en koro —
Ke vi nun izola ekrestos,
Ke en maljuneca kruela doloro
Ĉe vi parenculo malestos,
Al vi li ne diros parolojn kunsentajn,
Al vi li ne kombos la harojn argĝentajn.

“Ho, ve al mi! Kvankam brilados la nomo
De Iftah en ĉia nacio,
Sed Iftah ekmortos, kun li — lia domo:
Mi iras senfrukta al Dio.
Ho ve al mi, patro! Vi nepon ne konos,
Konsoloj el buŝo parenca ne sonos.

“Nun, patro amata, kun la amikinoj
Mi iros sur montojn najbarajn,
Ni tie sur suproj, ĉe ŝtonaj ruinoj
Sonigos malĝojajn gitarojn
Kaj kun la plorantaj eksonoj sonoraj
Ni kantos pri miaj animaj doloroj:

“Ke mi ne ekĝuis la edzajn karesojn,
Ne portis infanon sub koro,
Ne povis pliigi patrujajn sukcesojn
Per filoj, kovritaj de gloro,
Ke mortas nun mia virgeco floranta
Kun ĝojo multnombra, en ĝi troviĝanta.”

Ne trono altega sin levas sur placo, —
Sin levas altega lignaro;
Ne krioj de ĝojo bruadas en spaco, --
Bruadas kaj ĝemas viraro,
Kaj tie, en blanka vestaĵo el lino,
Silente sursidas palega fraŭlino.

La viroj ĝemegas, la viroj sopiras,
Virinoj en larmoj plendronas,
Sed Iftah kun torĉo brulanta aliras
Kaj fajron al lignoj aldonas.
La lignoj ne volas kaj kontraŭ sin metas,
Sed Iftah obstinas kaj pajlon enĵetas.

Kaj jen ekkriegis l' amaso popola,
Kaj eĥo eksonis en valo:
Bruliĝis subite la aro tremola
Leviĝis fumega vualo,
Ekblovis, ekfajfis ventego kruela,
L' oferon alprenis al si la ĉielo. —

Kaj jen ĉiujare la izraelinoj
Kunvenas por plori sur montoj,
Kaj tie ĉi brilas la fajr-iluminoj,
Sonadas malgajaj rakontoj,
Kaj laŭte aŭdiĝas sonado de ĥoroj,
L' aero pleniĝas de ĝemoj kaj ploroj.

La izraelinoj parolas pri l' bela
Fraŭlino brulig-oferita
Kaj dankas fervore al sankta ĉielo
Pro venko, de ĝi donacita,
Kaj sendas al Dio petegojn humilajn
Forigi de l' lando terurojn similajn.
Amiko.

Eltiro el privata letero

de s-ro L. Zamenhof al s-ro W. H. Trompeter, presita kun permeso
de ambaŭ korespondantoj.

... Kaj nun mi parolos pri la entrepreno de s-ro Wahren. En la daŭro de la lastaj 5--6 jaroj tre ofte aperadis diversaj projektoj de diversaj personoj kun la laŭtaj pretendoplenaj vokoj: "venu al ni, ni kunigos ĉiujn sistemojn, ni kreas lingvon idealan, kiu plaĉos al ĉiuj, ni prezentas internacian societon aŭ akademion, ni laborados kune" k. t. p. Kvankam mi ĉiam sciis, ke en tia afero, kiel kreo kaj enkonduko de lingvo, inter *voli* kaj *fari* estas grandega, grandega paŝo, mi tamen en la komenco kredadis al ili kaj promesadis al ĉiu el ili mian plenan helpon, kiam ili montros al mi klare, en kia maniero ili esperas atingi tiun komunan interkonsenton pri ĉiu formo kaj pri ĉiu vorto de la estonta lingvo. Mi ripetadis al ili tion, kion mi jam kelkfoje esprimis en miaj verkoj: ke se la plimulto eĉ decidis, ke la estonta lingvo internacia devas esti radikale diferenca de la nuna Esperanto, mi akceptos tiun ĉi lingvon kun granda plezuro, se ĝi nur efektive kaj reale ekzistos kaj estos akceptita; sed mi ne povas forĵeti lingvon tute pretan, super kiu mi laboras jam 20 jarojn, por aliĝi al io, kion oni ankoraŭ volas komenci krei kaj pri kies malfacileco oni ne havas ankoraŭ klaran ideon.

Baldaŭ efektive montriĝadis ĉiŝoj, ke ĉiu el tiuj ĉi laŭtaj projektoj restis nur projekto kaj faris nenian paŝon plu. Nur du el tiuj ĉi projektantoj (s-ro Lentze kun sia "Interpretor" kaj s-ro Lott kun sia "Kosmopolit") provis efektive *labori* por sia projekto kaj fondis gazetojn, kiuj ambaŭ falis post unu jaro (ne pro manko de financoj ĉar tia malgranda gazeteto kiel "Kosmopolit" ne postulis ja grandajn financojn sed pro tio, ke kiam ili el la sfero de eterna projektado devis transiri al efektivigado, ili ne sciis kiel tion ĉi fari, kaj la partianoj forkuris de ili, ĉar ĉiu kapo havis apartan opinion).

Ĉiu el tiuj ĉi sinjoroj aparte pensas ne sole, ke li proponas la plej bonan, sed ke ankoraŭ li estas la plej senpartia *unuiganto* de ĉiuj. Ŝajnas al ili, ke ili subtenas unu la alian — ĉar efektive, antaŭ ol ili komencas la realigon de siaj projektoj, ili kompreneble havas ankoraŭ nenian kaŭzon por malpacigi, kaj ĉiu povas ankoraŭ esperi, ke ĉio fariĝados precize laŭ *liaj* planoj. Sed apenaŭ iliaj laboroj iom moviĝas antaŭen, tiam ĉiu sobre rigardanta homo povas tuj rimarki, ke ili celas ne al unuigo, sed nur al apartigo. Jen ekzemplo:

Ekzistis iam Akademio Volapŭka. Nun de tiu ĉi Akademio restas nur ombro, kiu konsistas el prezidanto, s-ro Rosenberger, kaj 8—10 membroj, kiuj ekzistas nominale sur la papero, sed nenion faras. S-ro Rosenberger en liberaj minutoj eldonas de tempo al tempo malgrandajn cirkulerojn, en kiuj li proponas sian propran novan sistemon laŭ la tipo de Esperanto, kaj li dissendas la cirkulerojn al la "membroj" kiuj aŭ silentas aŭ indiferece aprobas — kaj

s-ro Rosenberger publikigas tion ĉiufoje kiel decidon de la "Akademio Internacia". Li petis min, ke mi fariĝu membro de tiu "Akademio", kiu "portas nur la nomon Volapŭka, sed laboras por lingvo nova el vortoj internaciaj". Mi respondis, ke mi povus aliĝi nur tiam, se la "Akademio" (kia laŭta nomo!) ĉesos porti la nomon Volapŭka, ĉar alie la mondo dirus, ke mi forĵetis Esperanton kaj fariĝis volapŭkisto. Ĉar li diris, ke li volas unuigi la volapŭkistojn kun la esperantistoj, tial mi proponis la nomon "Akademio volapŭko-esperanta". Li tion ĉi *ne* konsentis. Kiam, mi antaŭ 1½ jaroj, proponis reformojn en Esperanto, li denove skribis al mi, kaj mi respondis al li jenon: "Vi diras, ke Vi volas krei lingvon similan je Esperanto, sed diferencon de la *nuna* Esperanto; sekve anstataŭ voki min, ke mi kune kun ĉiuj esperantistoj forĵetu la pretan fundamenton kaj aliĝu al Vi, kiu ankoraŭ nur *intencas* ion krei. — estas ja pli bone kaj pli juste, ke Vi kun Via malgranda rondeto aliĝu al *mi*, kie Vi havas ja plenan rajton, tiel same kiel ĉiu alia, proponi ĉiajn eĉ plej radikalajn reformojn, kiujn Vi volus" (tio ĉi estis en 1894). — Li *ne* konsentis, kvankam tiam oni ne povis ankoraŭ antaŭvidi, ke reformoj ne estos akceptitaj kaj kvankam li riskus nenion kaj povus en ĉia tempo eliri (dum *mi*, transirante de Esperanto al alia sistemo, mortigus per tio ĉi Esperanton por ĉiam)!! Tiam mi konvinkiĝis, ke ĉiuj liaj paroloj pri komuna laborado estis nur blindigado de aliaj personoj kaj de li mem (ĉar mi pensas, ke ne en malbonaj intencoj li tion ĉi faris, sed simple el ne sufiĉa kritikado de siaj propraj agoj); ke li (aŭ la "Kadem") deziras nur havi mian *nomon* en la "Akademio", por ke ili povu diri al la mondo, ke Esperanto mortis, ĉar ĝia propra aŭtoro forĵetis ĝin kaj aliĝis al la sistemo (ankoraŭ ne kreita!) de la "Kadem", t. e. de s-ro Rosenberger!

Tiel same, kiel s-ro Rosenberger, agas ankaŭ s-ro Wahren kaj aliaj; Ĉiuj ili parolas pri "komuna laborado", sed en la koro ĉiu el ili pensas, ke nur *liaj* opinioj estas la plej prudentaj, kaj li esperas, ke ĉio estos akceptita nur en tia formo, kiun li mem proponos. Nun, kiam ili vidas, ke reformoj proponitaj en Esperanto ne efektiviĝis, ili diras, ke reformado montriĝis nebla kaj *tial* (!) ili devas krei novan sistemon. Kia mirinda kaj naŭva logiko! Ili konfesas, ke la fundamento de la lingvo Esperanto estas bona kaj nur detaloj al ili ne plaĉas — kaj tamen ili pensas, ke krei kaj enkonduki ion tute novan estas pli facile ol reformi! Se ili tion ĉi efektive kredas, ĝi venas de tio, ke ili ne scias la efektivaĵojn *kaŭzojn* kial la reformoj en 1894 ne efektiviĝis. La reformoj ĝis nun ne efektiviĝis pro la sekvantaj kaŭzoj: .

1) Montriĝis, ke kiom da kapoj, tiom da opinioj, — kio plaĉas al unu, ne plaĉas al alia, kaj ke tia grandega entrepreno, kiel reformado de tuta lingvo, *per leteraj voĉdonoj* estas absolute neatingebla. — Sed se tio ĉi montriĝis ne ebla por *reformado*, ĝi estas ja ne pli facila, sed *multe pli malfacila* por kreado de tute nova lingvo.


2) La nuna Ligo Esperantista prezentis ne sufiĉan *aŭtoritaton*, kaj tial la plimulto timis, ke se oni hodiaŭ reformos, morgaŭ novaj esperantistoj postulos novajn reformojn kaj postmorgaŭ estos necesaj denove aliaj radikalaj reformoj. — Sed se tion ĉi oni timis ĉe lingvo longe preparita kaj ellaborita kaj ĉe decido de multaj centoj da personoj, oni ĝin ja *pli multe timos* ĉe lingvo en rapideco kreita de 4—5 personoj. Ĉar se tiuj ĉi kelkaj personoj eĉ ne malpacigiĝos inter si tuj en la komenco de la kreado, — kio donas al ili la rajton esperi, ke kiam ilia lingvo atingos kelkajn centojn da adeptoj, tiuj ĉi adeptoj ne ekpostulos reformojn? Se eble ili pensas, ke ili povos

poste denove konstante reformadi, tio ĉi estas grandega eraro, ĉar lingvo estas *pure kondiĉa signado de ideoj*, kiu povas plenumi sian difinon nur tiam, se ĉiuj uzas ĝin *severe egale*, — alie ĝi perdas ĉian sian sencon kaj celon kaj servas ne al reciproka komprenigado, sed nur al malkomprenigado.

Se venos iam la tempo, por perfektigi la detalojn de nia lingvo, ni povos tion ĉi atingi nur per aŭtoritata kongreso, t. e. per kolekto de 20—30 personoj, kiuj nia tuta amikaro elektos kaj plene rajtigos, kaj kiuj kunveturos ĉiuj en unu urbon, sidos tie ĉi kune sufiĉe longan tempon kaj preparolos kaj prijuĝos ĉion *buse*. Sed por tio ĉi estas necese, ke ni nun ankoraŭ ne parolu pri la detaloj, sed ke ni antaŭe fariĝu sufiĉe *fortaj*, por ke ni povu aranĝi tian kongreson kaj por ke la decidoj de tiu kongreso estu *aŭtoritataj* por ĉiuj tempoj. Nun la tempo por tio ĉi ankoraŭ ne venis, kaj ni devas esti paciencaj. Se pro diversaj detaloj ĉiu volos nun komenci kreadon de novaj sistemoj kaj peni detruigi kaj diskreditigi la jam ekzistantan, — ni neniam elrampos el la sfero de projektoj kaj teorioj kaj nia ideo baldaŭ pereos.

Vi vidas, kie mi tre multe parolis pri la projektoj de s-ro Wahren kaj aliaj, kvankam la plej bona estus silenti pri ili, ĉar post kelke da monatoj aŭ jaroj de ili restos renia signo, tiel same kiel de centoj da aliaj projektoj. Sed ili enhavas en si unu flankon danĝeran, nome: per siaj laŭtaj frazoj pri perfekteco, pri komuna internacia kreado, ili blindigas la mondon kaj povas malvarmigi por nia afero multajn ne sufiĉe spertajn amikojn. Estas vero, ke se kelkaj niaj amikoj provos aliĝi al ili, tiuj ĉi amikoj tre baldaŭ konvinkigos, ke ĉio estis nur vortoj, kaj ili revenos denove al ni (kiel ekzemple antaŭ kelkaj jaroj s-roj W., R. kaj M. fariĝis partianoj de s-ro Lott kaj post 2—3 monatoj ĉiuj denove revenis al Esperanto), sed ekzistas personoj, kiuj, unu fojon defalinte, poste jam hontas reveni, — kaj tiuj ĉi hontantoj estos jam perditaj por ni.

Mi devas aldoni, ke kontraŭ la *personoj* de s-roj Wahren kaj Rosenberger mi nenion havas kaj mi kredas, ke iliaj *intencoj* estas noblaj kaj honestaj; sed kontraŭ ilia *agado* mi devas batali, ĉar tiuj ĉi “amikoj” de nia ideo multe pli detruas nian ideon ol ĉiuj plej fanatikaj malamikoj: Kiel forte jam staras nun eble nia afero, se diversaj reformistoj, perfektigistoj, novasistemistoj kaj unuigistoj ne laboradus por ĝia diskreditigado kaj detruado sub preteksto de amo al la afero! Per siaj diletantaj eksperimentoj ili ne detruos la aferon, kiu englutis jam tiom multe da seriozaj laboroj kaj oferoj; sed la estonta historiisto de nia afero eble diros iam pri ili: “ili faris ĉion, kion ili povis, por detruigi la aferon kaj se la afero tamen atingis sian celon, tio ĉi ne estas jam ilia kulpo”.



Sultano kaj saĝegulo.

(Turka fabelo de Habun-bejo).

El la lingvo rusa tradukis V. Gernet.

(Daŭrigo.)

Daŭrigante siajn serĉadojn, Abu-Amran dekliniĝis en unu el la flankaj ĉambroj. Li eksentis sub siaj piedoj molan smirnan tapiŝon kaj estis ĉirkaŭblovita per malvarmeto; la aero estis tie ĉi saturita de bonodorajoj kaj penetrata per delikataj ŝprucoj de freŝiganta malsekaĵo; la okulkovrilo de Abu-Amran tralasis agrablan lumon, penetrantan en la ĉambrojn tra koloraj vitroj.

“Mi salutas vin, ho saĝegulo! Vi venis ĝustatempe, ĉar mi enuas“, eksonis melodia virina voĉo.

“Kiel do mi povus vin distri?“ demandis Abu-Amran.

“Ha! Vi certe scias legi la sorton de l' homo sur lia manplato. Kvan-kam vi ne devas forpreni la kovrilon, en miaj ĉambroj vi povas sendanĝere ĝin fari: neniu ekscios. Se do ni ekkonos unu la alian pli detale, vi mem diros, ke pro mi estas eble iam flankigi viajn severajn regulojn.“

“Ne ĉio ebla estas nur tial permesita, ke ĝi estas ebla. Malbono ofte estas distingebla nur per tio, ke ĝi estas pli facile farebla, ol bono. Krom tio mi eĉ ne povus tralegi vian sorton.“

“Kiel? Vi tiel instruita kaj saĝa persono, ne scias legi tion, kio estas notita de l' anĝelo-gardisto sur la manplato de la homo antaŭ lia naskiĝo?“

“Tion ĉi scias nur trompistoj, kiuj, vere, ne estas ĉiuj malsaĝuloj, sed ĉiujn malsaĝigas.“

“Ĉu vi scias laŭ la steloj antaŭdiri al la homo, kio atendas lin en estonteco? Ĉio ja dependas de la steloj, ĉu ne vere?“

“La Sinjoro antaŭdifinis la stelojn ne por ke ili aranĝu la homan sorton kaj ankoraŭ malpli por ke laŭ ili la homo ekkonadu sian sorton. La scio, atingebla por la homo, havas tri fontojn: personan prudenton de l' homo, nutrantan sin per la sperto de l' vivo; komunan prudenton, kolektitan kiel mielo per laboroj de l' saĝuloj kaj esprimantan sin en la scienco, kaj, fine, dian prudenton, esprimitan en la Revelacio. Pri la influo de l' steloj je la homa sorto oni nenion povas ĉerpi el tiuj ĉi fontoj.“

Jam en la komenco de sia parolado Abu-Amran ekaŭdis la sonojn de liuto, — komence unu akordon, poste mallaŭtan sorĉantan melodion, kiu aliformiĝis en pasian kanton, supersonintan liajn vortojn.

Estis klare, ke oni ne aŭskultas la saĝegulon. Li komprenis, ke oni lin tie ĉi ne bezonas, kaj de neniu detenata eliris el la ĉambro.

Longe ankoraŭ eraradis Abu-Amran, ĝis li fine sin trovis en unu salono, kie liaj paŝoj sur la marmora planko laŭte resonadis en alta arkajo. Palpante la murojn, li eksciis, ke li sin trovas en loĝejo, sur kies muroj ĉie pendas armoj.

Perdinta la fortojn Abu-Amran mallevis sin sur malmolan kanapon, kiu estis apenaŭ pli alta, ol la planko.

Enirante la saĝegulo aŭdis voĉojn de kelkaj homoj, vive traktantaj pri io. La voĉoj komence eksilentis ĉe lia alproksimiĝo, poste unu el la apudestantoj sin turnis al Abu-Amran.

“Videble malfacilan problemon donis al vi la sultano. Mi eĉ dubas, ĉu ĝi estas solvebla.“

“La suno jam estas proksima al subiro, — vi certe ne havos sufiĉe da tempo ĝis la limtempo“, aldonis la alia.

“Mi mem ankaŭ malesperas, respondis Abu-Amran; mi estas tamen certigita, ke mi ne havis ankoraŭ la feliĉon renkonti la sultanon. Mi eble ne ekscios lin ekkoni, se mi lin renkontos; sed en nombro de tiuj, kiujn mi renkontadis, la sultano forestis, — mi estas certigita.“

“Kion do fari? La sultano devas konvinkiĝi je via fervoro, se eĉ al vi ne prosperos solvi la problemon — diris la tria. Donu al li freŝigantan trinkaĵon. Malfeliĉa homo, kiom vi estas lacigita!“

Kiam servanto estis alportanta la trinkaĵon al Abu-Amran, la unua voĉo ree eksonis:

“Oni tre multe paroladis pri vi al la regnestro de-iluziita kaj malĝojigita de via malsukceso”.

“Mi pensas pli bone pri la sultano“, rediris tiu, kiu ordonis doni la trinĝojn al Abu-Amran. La regnestro eltiros el tiu ĉi okazo la edifon, ke io superiganta la homajn fortojn estas postulebla de neniu“.

“Mi ĵuras, mi aŭdas mian Potenculon“, ekkriis Abu-Amran, rapide leviĝinte de la kanapo kaj falinte sur la teron antaŭ la parolanto. “Permesu, ho regnestro, forigi la okulkovrilon kaj lasu min ekvidi vian klaran vizaĝon!“

La sultano levis Abu-Amran'on, forigis la okulkovrilon kaj kisis la saĝegulon.

“Rakontu al mi, kiun vi ekkonadis en la vojo kaj kiel vi divenis, ke mi estas antaŭ vi“, — scivole demandis la sultano.

“Komence mi renkontadis homojn el la plej malalta servantaro.“

“Laŭ la moro distinganta tiujn, kiuj apartenas aŭ devas aparteni al tiu ĉi klaso, ili mokis la homon pro lia sendefenda situacio.

“Mi estis ĉe mulla*) — kaj ekkonis lin, ĉar li minacis min per tio, kion li mem ne kredas: la tre ofta alproksimiĝo al la sanktaĵo malpligrandigas ĉe la homoj de tiu klaso la respektigon antaŭ la sanktaĵo kaj siavice naskas senkredon.

“Mi estis ĉe virino kaj mi estas konvinkita, ke ŝi estas bela:

“ĉar tiu ĉi virino celis ekscii sian sorton; tia scivolo estas nur ĉe belaj virinoj. Nebela nenion atendas de l' sorto;

“por tiu ĉi virino estus agrable, se viro rompus por ŝi sian devon; — el la certa tono estis klare, ke la persono, pri kiu mi parolas, kutimis havi sukceson sur tiu ĉi areno kaj ke, sekve, ŝi havas rimedojn por tia venko; la plej efektiva rimedo de virino por atingi tian celon estas ŝia beleco, kiun la virino malofte uzas por pli bonaj celoj;

“tiu ĉi virino proponadis demandojn kaj ne aŭskultis la respondojn: — jen estas tria trajto, distinganta belajn virinojn, kiuj ordinare estas pli okupitaj de si mem, ol de la tuta ĉirkaŭaĵo.

“Entute mi distingadis la homojn en via palaco laŭ tiu senerara signo, ke ju pli alta estas la rango, la stato kaj la ofico de l' homo, des malpli li penas sin montri grava kaj des pli simpla estas lia agado.

“Vin, ho granda regnestro, mi ekkonis per tio, ke vi montris vin la plej favora!“

La sultano aŭskultadis la saĝegulon kun videbla plezuro.

“Mi estas feliĉa, trovinte en mia lando tian homon, kia vi estas“, diris li al Abu-Amran. “Vi devas fari por mi oferon kaj resti en mia palaco kiel kuracisto, konsilisto kaj amiko. Petu min pri kian vi volas favoro“.

— “Ho, regnestro! se la unuan vi nomas ofero, tiam mi petas kiel favoron, ke vi min lasu por fini la sciencan laboron en mian solecon por kvardek tagoj kaj ordonu ke tiun ĉi favoron dividu kun mi la kortega mulla, ĉar tiel mi promesis al li. Kompreneble en daŭro de tiu ĉi tempo li ne havos la eblon kontentigi iajn kutimojn, sed la piaj interparoladoj kaj konsideroj en mia ĉambreto turnos lin eble al la vera kredo, — almenaŭ duone.

La sultano ridante permesis.

Estas dubeble, ĉu kun precipe granda plezuro akceptis la mulla la dividon

*) Turka pastro.

de la sultana favoro, honeste plenumitan de Abu-Amran; sed post kvardek tagoj Abu-Amran kaj la mulla revenis en la palacon.

Abu-Amran ne sole fariĝis proksimulo de la sultano, sed ankaŭ la gloro de liaj scioj ĉirkaŭiris la tutan mondon. De ĉiuj flankoj de l' mondo oni turnadis sin al li por konsiloj kaj solvoj de la plej diversaj demandoj, la mal-
sanuloj do kunfluadis de la tuta Oriento al la antaŭpordo de lia domo.

Estus bone por tiu el la viroj de l' leĝo kaj scienco, kiu povas en la batalo de l' vivo sekvi la instruon de Abu-Amran. Por tiu malfermos sin la pordo de l' paradizo preter la purigejo, kvazaŭ por militisto, kiu falis en batalo por gloro de Allaho.

ANONCOJ.

Rusaj abonantoj volu sin turni al s-ro V. Gernet, Troickaja kaj Remeslennaja 11, *Odessa*.

Francaj abonantoj sin turnu al s-ro L. de Beaufront, *Epernay*, Marne.

Germanaj — al s-ro W. H. Trompeter, *Schalke*, Westfalen.

Portugalaj — al s-ro Costa e Almeida, *Rezende*.

Ĉe tiuj sinjoroj oni mendas la gazeton kaj pagas al ili la abonpagon.

Aliaj volu mendi la gazeton aŭ per la poŝto aŭ rekte ĉe la redakcio. La monon oni plej bone ensendas per poŝta mandato.

Nova verko en la lingvo Esperanto:

La literaturisto kaj lia fianĉino

Rakonto de **E. Flygare-Carlén**.

Trad. Otto W. Zeidlitz.

Eldono de la Esperantista Klubo
en Upsala.

Kosto 0,50 fr. = 0,40 kr. = 0,40 mrk.
= 0,20 rub.

Ricevebla de *Upsala Esperantoförening*, Upsala.

Depot' da semoj.

M. I. Fedorovski

(Rusujo, Moskvo, Sadovaja, Krasnija
vorota, domo Rauzer)

vendas

ekonomiajn, legomajn, florajn kaj aliajn semojn de la plej bona eco. La plena katalogo estas elsendata por 80 kopek en poŝtsignoj; al eksterrusaj aĉetantoj — *senpage*. La eksterrusaj mendoj estas akceptataj ankaŭ en la lingvo Esperanto.

Pago por anoncoj en la "Lingvo internacia":

20 centimoj = 15 öre = 15 pfenigoj = 8 kopekoj por la loko, okupata de la duonpaĝa linio da petito. Por grandaj kaj konstantaj anoncoj rabato. Anoncoj, kiuj havas signifon por progreso de la lingvo Esperanto,

senpage.

Ĉiu paginta por kvar ekzempleroj de la "Lingvo internacia" ricevas la kvinan

senpage.